

# ESPERANTO

sub la suda kruco

decembro 2023





# ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA  
ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 30[4] numero 152 decembro 2023

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktisto: Terry Manley

Provlegantoj: Donald Rogers, Trevor Steele, Nicole Else

Kunordigisto: Jonathan Cooper

Kontaktadreso: [esk@esperanto.org.au](mailto:esk@esperanto.org.au)

AEA – ESK

GPO Box 2122

Melbourne, Victoria 3001

Australia

## Abonoj kaj pasintaj numeroj

*Esperanto sub la Suda Kruc* estas sendata al membroj de la Aŭstralio Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZE).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA: [esperanto.org.au](http://esperanto.org.au) / [info@esperanto.org.au](mailto:info@esperanto.org.au)

NZE: [www.esperanto.org.nz](http://www.esperanto.org.nz) / [esperantonewzealand@gmail.com](mailto:esperantonewzealand@gmail.com)

## Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruc

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, [esk@esperanto.org.au](mailto:esk@esperanto.org.au)

Artikoloj kaj originalaj en Esperanto kaj tradukitaj en Esperanton estas akcepteblaj. Sed NE sendu permaŝinajn tradukojn (ekzemple per Google Translate).

## Limdato por kontribuoj por la sekva numero

1a de februaro 2024

La redaktistoj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2023 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj  
ISSN 2207-0087

**SUR LA KOVRILO:** *Joanne kaj Petro Johns ĉe la Melburna Centro de la Artoj, kun broĉo montranta la vizaĝon de Marcel Leereveld – Vidu paĝojn 5, 6.*

Pri aliaj fotoj, vidu paĝon 26.



# ENHAVO

Antaŭparolo	04
Marcel ankoraŭ vizitas la operon	05
Kristnaska kvizo	06
100-jara memorevento en Kyoto-Fu	07
Venu kun mi galeriumi	08
Gore Vidal, brilulo kun piedoj el argilo	10
La kontraŭdiroj de la vivo	12
Lingva komento pri artikolo en ESK 150	14
La mondo de Harry Potter	15
Bahaismo kaj Esperanto	17
Kiel lerta estas AI?	20
Mia Danujo	22
La kongreso kaj somerkursaro 2024	25

# Antaŭparolo

**TERRY MANLEY**


En aŭgusto AEA ricevis diplomon de UEA pro elstara agado dum multaj jaroj pri organizado kaj okazigado de somerkursaroj, plus pri la organizado de la monata prelegserio dum la lastaj tri jaroj.

La unua AEA-a somerkursaro okazis en Toowoomba en 1977 antaŭ 46 jaroj. Dek naŭ partoprenis inkluzivante tri instruistojn. Trevor Steele gvidis la altgradulojn. Li sekve faris tion dum jardekoj. Ĝis 1993 la somerkursaro okazis ĉiun duan jaron, sed post tiam preskaŭ ĉiun jaron. En 1994 okazis kune, kongreso kaj kursaro en Adelajdo. Estis apartaj kongresoj en 1995 kaj 1996 sed poste la kursaro kaj kongreso kuniĝis, escepte en 2004, 2012 kaj 2013 kiam estis nur kongresoj. Do entute ĝis nun estis 34 somerkursaroj de AEA (foje kuna afero kun NZEA). Kvankam AEA-aj kongresoj ofte enhavis kursojn, la diferenco pri AEA-a kursaro kompare al kongreso estas, ke matene nur kursoj de diversaj (3-4) niveloj okazas. AEA dum jardekoj invitas eksterlandajn instruistojn por levi la nivelon de la lecionoj kaj internaciigi la aferon. En 2024, por la 35a Somerkursaro,

AEA invitas du eksterlandajn instruistojn, Orlando E Raola el Usono kaj Hoan Tran el Vjetnamio. Aliĝu kaj venu al memorinda afero en Ballarat: [esperanto.org.au/kongreso](https://esperanto.org.au/kongreso)

Kongresoj kun la diverseco de prelegoj, ekskursoj, teatraĵoj, muziko, forumoj kaj kursoj ĉiam allogas. En la jaroj kiam kongreso kaj kursaro kunfandiĝis, la kursaroj alprenis tiajn allogaĵojn kaj tial alvenis la kursara/kongresa evento. Aŭ ĉu kongresa/kursara evento?

Indas mencii la subtenon de NZEA por ricevi tiun diplomon. En 1992, 1994, 2000, 2004 kaj 2008 (Oceana K) estis kunaj kongresoj de AEA kaj NZEA, por kundiĉi la aferojn, kaj organize kaj finance. Dum la lastaj jaroj NZEA subtenas AEA-on, notinde por la 1a kaj 2a trilandaj kongresoj/kursaroj en Indonezio.

Instigate de la limigoj pro KOVIM19, en Julio 2020 la prezidanto de AEA, Sandor Horvath, komencis organizi ĉiumonatan prelegserion de esperantistoj. Ĝis oktobro ĉijare 18 prelegserioj okazis plej ofte kun du prezentaĵoj. Se vi ne jam spektis ĉiujn, iru al la retejo de AEA: [esperanto.org.au/eo/prelegserio-zoom](https://esperanto.org.au/eo/prelegserio-zoom) 



# Marcel ankoraŭ vizitas la operon

**JOANNE JOHNS (MELBURNO)**

Dum sia vivo Marcel Leereveld regule vizitis operojn, kaj fojfoje eĉ donis al Petro kaj mi biletojn, se li ial ne mem povis ĉeesti koncerton por kiu li jam aĉetis biletojn.

Post lia morto, la familianoj de Marcel celebris lian vivon kaj amon de la opero per kortuŝa funebra ceremonio, dum kiu kantis du operaj kantistoj. Laŭ mi, Marcel estus taksinta tion tre taŭga kaj ĝuinda. Poste, mi pensis ke estus ankaŭ konvene se unufoje ĉiun jaron, Petro kaj mi certigus ke Marcel povu refoje viziti operon. Do mi metis linion en mia buĝeto por operaj biletoj kaj atendis.

Post la referendumo mi sentis min iom malfeliĉe, do kiam mi vidis ke estas nova opero pri niaj unuaj popoloj, mi tuj sciis ke mi trovis la operon por ĉi tiu jaro. *La vizitantoj* rakontas pri la alveno de

blankuloj en Aŭstralio en 1788, kaj ĝiaj efikoj sur la indiĝenaj popoloj.

Mi aĉetis biletojn kaj eklaboris pri la venonta grava paŝo - kiel kunporti Marcel kun ni! Mia unua ideo estis aĉeti broĉon kun bela kadro, en kiu mi povus meti foton de Marcel. Tamen mi ne vidis tian broĉon ie en la butikoj, kaj subite estis jam la tago antaŭ la koncerto. Feliĉe, mi kapablis trovi sufiĉajn materialojn en mia stoko ĉehejma por mem krei broĉon. Mi eltranĉis foton de Marcel el malnova numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* kaj gluis ĉion. [Vidu la kovrilon.] Nun ni estis pretaj!

La opero okazis ĉe Arts Centre Melbourne kaj inkluzivis multajn indiĝenajn Aŭstralianojn inter la kantistoj, muzikistoj, kaj skipo. Originale *La vizitantoj* estis teatraĵo, sed Jane Harrison adaptis

*Daŭras >*



*La vizitantoj*

sian verkon al opero, kun la helpo de komponisto Christopher Sainsbury.

Sur la scenejo estis nur kelkaj blankaj, senfoliaj arboj kaj kelkaj seĝoj, sed la lumigado kaj projekciado lerte ŝanĝis la aspekton kaj etoson de la scenoj. La muziko estis moderna, foje sonis ĵaze, foje indiĝene, kaj foje tradicie "opera". La kantistoj kantis angle, sed estis kelkaj indiĝenaj vortoj, kiuj estis klarigitaj en la surteksto.

La diversaj voĉaj registroj donis eĉ pli da profundeco al ĉiu rolanto, kaj malgraŭ la fakto, ke mi (kaj ĉiuj) jam sciis kiel la rakonto finiĝas, mi involviĝis en la intrigo kaj forte esperis ke la indiĝenoj ne bonvenigos la vizitantojn.

Malgraŭ la malfeliĉa temo, mi tre ĝuis *La vizitantoj*, kaj esperas ke ankaŭ Marcel ĝuis ĝin. **E**

---

## Kristnaska kvizo

1. Kiuj pagana kaj malnov-romia festoj estas la bazoj de la nuna Kristnasko?
2. En la okcidenta tradicio, kiuj estas la nomoj de la tri reĝoj?
3. Pri kiu religia reforminto oni diras, ke volante kapti la belecon de steloj, li dekoraciis sian arbon per kandeloj, kreante tiel la nunan kristnaskarbon?
4. En kiu lando estis produktitaj, la unuan fojon, la kristnaskarbaj brelokoj?
5. En pluraj Eŭropaj landoj oni celebras la tagon de Sankta Nikolao, kiu portas donacojn simile al Paĉjo Kristnasko. En kiu decembra tago estas lia festo?
6. Kiu nordia dio estis la ekzemplo por la ideo de Sankta Klaus fluganta tra aero?
7. Clement Clarke Moore verkis poemon, en kiu li donis al Santa sledojn kaj boacojn kaj venigis lin malsupren tra la kamentubo. Kio estis la titolo de la poemo?
8. Kiu malpermesis kristnaskajn kantojn post la angla interna milito en 1647?
9. Kiu estas la parazita planto regule uzata dum Kristnasko en anglalingvaj landoj?
10. Esperantistaro havas sian propran decembran feston. Kio ĝi estas? Kial ni celebras ĝin?

Fonto: magazino *The Flower Arranger*, vintro 2020

Respondoj sur paĝo 26 **E**



# La 100-jara memorevento de Esperanto Populariga Asocio, Kameoka en Kyoto-Fu

**GARRY SMITH (TORQUAY, VIKTORIO)**

Mi komencis lerni Esperanton antaŭ sep jaroj, pro la influo de mia edzino, kaj pensis ke lernado helpos min pri pli bona cerba funkciado. Mi ankaŭ kredas, ke pli bona komunikado per unu lingvo estus utila por la mondo.

Ekde nia vizito al kvartaga kurso, en la angla, ĉe la Aŭtuna Granda Festivalo de Oomoto en 2014, mia edzino kaj mi iĝis amikoj de EPA.

Min ege impresis la tuta evento. Oomoto aranĝis ĉion perfekte kaj havas grandan kapablon organizi grandan grupon. Mi estis tute impresita pro la maniero de harmonia organizado de la evento, ĉar la sistemo fluis perfekte. La esperanta baza klaso de Katalin Kováts estis elstara kaj amuzplena. La 527 esperantaj mallongaj poemoj (Uta-oj) kolektitaj el geamikoj tra la mondo estis dediĉitaj al la Universala Sanktejo ĉe la

piramida sankta turo sur la scenejo. Unu post la alia, muzikistoj, kiuj portis tradiciajn kostumojn de la 6a jarcento kaj ludas kopiojn de tiamaj muzikaj instrumentoj (Yakumo Goto – dukorda harpo, kaj Yumi Daiko – tamburo frapata per du longaj bastonetoj) kantis

ĉiujn preparitajn poemojn. Per tio ili disaŭdigis mondpacan mesaĝon per la plej frua sankta melodio, nomita Yukumo Sinka de Japanio.

La ferma festivalo estis mirinda, kun manĝaĵo, trinkaĵoj kaj komunikado kun homoj el dek naŭ landoj de la mondo. Gratulojn al Oomoto!

Mi estas tute impresita pro la maniero per kiu Oomoto komunikas kun ĉiuj homoj de la mondo. Sindonaj gvidantoj de la pasinteco kaj nuntempo kaj la 350 partoprenantoj bunte intermiksiĝis por krei mirindajn bonon kaj energiojn al ĉiuj.

Kun klimata ŝanĝiĝo kaj militoj, la mondo ne estas sekura loko. Grupoj kiel Oomoto povus transporti Esperanton, disciplinon, amon kaj pacon harmonie tra la tuta mondo, por igi la mondon pli bona loko. **E**



La 100-jara Memorevento de la Fondiĝo de EPA  
エスペラント普及会創立100周年記念行事

2023.9.16-18

# Venu kun mi galeriumi

## KATARINA STEELE (ADELAJDO)

Mi ŝatas galeriumi. Kio estas tio? Iri de ekspozicio al ekspozicio, ensorbi la belon de verkoj, esti surprizata de ideoj, admiri la talentojn de artistoj. Adelajdo proponas multajn eblecojn por indulgi mian art-amon, speciale dum aŭgusto, kiam okazas la SALA (South Australian Living Artist)-festivalo. La ĉi-jara "kataloga" revuo de la festivalo listigis 692 grandajn-mezgrandajn-malgrandajn prezentaĵojn, fakte tra la tuta Sud-Aŭstralio, kie iu ion ekspozicias. Foje estas nur kelkaj pentraĵoj de juna amato sur la muroj de iu Foodland-vendejo, eble nur 5-6 bildoj en hospitala koridoro, sed povas esti ankaŭ verkoj de konata artisto en regiona galerio,

privata studio de famulo, aŭ arta vespero en teatro. Do festivalo de plej diversaj lokoj, manieroj, nombroj, teknikoj, gradoj de konateco kaj kvalito de arto.

Ĉi-jare la plej profundan spuron lasis sur mi mia renkontiĝo kun Silvio Apponyi.

Jam antaŭ jaroj kaptis mian atenton liaj etaj, 10-15-centimetraj figuretoj de bestoj. Ĉar mi mem estas hungardevena, ne eblis ne ekatenti pri la hungara familinomo, fama nomo. Estis agrabla surprizo, kiam mi trovis liajn jam granddimensiajn verkojn en Karinya Reserve, memorloko en Adelajdo honore al forŝtelitaj aborigenaj infanoj. La virina figuro kaj la vizaĝoj sur la *Fontano de Larmoj* estas tiom impresaj!

La studio de Silvio estis vizitebla ĝuste kadre de la ĉi-jara SALA-festivalo. Finfine mi havis la okazon renkonti lin persone. En la korto estis nefinita ŝtona sepio sur subaĵo el sveda marmoro. Plaŭ! Li ĵetis akvon sur la malsupron – "nun vi vidas la bluecan koloron pli bone!" Ni eniris la studion. Ĝi estas fakte granda ŝedo, plenplena de iloj, ankoraŭ neuzitaj skulpt-materialoj, duonpretaj verkoj, bildoj kaj polvo. Sur unu tablo estis strangaj, ŝajne plastaj formoj. Jen, kiel oni faras muldon de la eta skulptaĵo por krei metalan formon, jen la sitelo de la uzata materialo, jen la metalaj "kopiaĵoj", tie kaj tie necesas forigi la metalan superfluaĵon de ili – li montris figuretojn de bestoj kaj reĵetis ilin en la stakon en unu angulo de la granda tablo. El eltirita tirkesto li elprenis nur 3-5 centimetrojn altajn ramurrestaĵojn de alkoj. El tiuj li iam faros ĉarmajn figuretojn de bestoj. "Ĉi tiuj estas la diversaj gratpapiroj necesaj por atingi la glatecon..."





Kiam mi pensis, ke li jam faris sian devon kaj adiaŭos nin, Silvio moviĝis antaŭen en la koridoro kaj ekparolis pri la sekva ejo de la ŝedo, kie estis pendantaj printaĵoj. Mi ne sciis, ke li faras ankaŭ tiujn. Kaj li rakontis interesajn aferojn pri siaj 11 vizitoj al Japanio. Kaj ke la grandan pezan presmaŝinon li faris propramane.

Denove en koridoro, plia ejo. Li menciis sian patrinon, jam la trian fojon. La vundoj estas ege profundaj. Li diras, ke li pardonis ŝin, sed kiam li kantis al ni la germanan kanton lernitan pro ŝi (ŝi estis germana), liaj okuloj larmis. Tie, sur la supra breto, estas ŝia argila kapo kaj apude skulptaĵo de vira kapo. Evidentiĝis, ke tiun faris la patrino pri la patro. Do, Silvio heredis sian talenton de ŝi!



Kiam mi demandis, kiun el siaj verkoj li pleje ŝatas, li menciis la fontanon en Karinya. Ĉar ĝi helpas repaciĝon. Ankaŭ lian.

Sur la muro en alia ejo paliĝintaj printaĵoj de familiaj fotoj. Ridetanta patro - Silvio kun siaj kvar infanoj. Aliaj grandaj, nur alpinglitaj fotoj en la mallarĝa koridoro, sur ĉiu Silvio kun grandega fiŝo enmane. Li rapide listigas la diversajn lokojn kaj landojn, de kie la bildoj devenas. Li estas feliĉa, kiam li fiŝkaptas.

El sia poŝo li elprenas etan best-figureton kaj kvazaŭ fajlileton, per kiu li prilaboras sian kreaĵon. Ĉiam li kunhavas iun kaj tuj ekumas, kiam liaj manoj estas liberaj. Kia pacienco! Kiom da talento!

En la korto antaŭ la ŝedo de Silvio laboris kelkaj aliaj skulptistoj. Ili afable klarigis al ni pri siaj verkoj. Gaja grupo en evidente harmonia rilato. "Ni iom laboras kaj poste eniras la domon kaj longe manĝas," diris unu el ili kun rideto. En la informilo estas indikitaj iliaj nomoj kaj ke temas pri "mini-simpozio" kadre de la Sudaŭstralia Asocio de Skulptistoj. Mi legis, ke tie en la Adelajdaj Montetoj, okazis jam tri internaciaj skulptistaj simpozioj kaj la informilo listas jam 26 skulptaĵojn kreitajn de artistoj el diversaj landoj, viziteblaj tra la skulptaĵ-itinero. Admirinde. Kaj certe vidinde.

Venu kaj kontrolu mem! 

# Gore Vidal, brilulo kun piedoj el argilo

TREVOR STEELE (ADELAJDO)

Liaj gepatroj nomis lin Eugene Luther Gore Vidal, sed li amputis la unuajn du nomojn. Dum kelkaj jardekoj li estis unu el la plej famaj usonanoj: verkisto multflanka, politika komentisto, populara intervjuato ĉe televidaj stacioj, eĉ hollywooda aktoro, kaj sprita provokemulo. Lia portreto aperis sur multaj magazinoj, kelkaj el liaj romanoj vendiĝis grandkvante, kaj li iĝis riĉulo: surface li plenumis "la usonan revon".

Sed Gore Vidal estis fine malfeliĉa homo, kies vivon markis multe da kontrastoj. Politike li kutime estis sur la flanko de la malriĉaj humiluloj, sed li imagis sin ido de aristokrata familio kaj li moviĝis en elitaj rondoj kaj verkis grandparte pri elituloj. Li estis en siaj junaj jaroj bela viro, kiu allogis multajn virinojn, sed li seksumis nur kun junaj viroj – kaj ĉiam asertis, ke seksumado kaj amo estas du diversaj aferoj. Lia ĉefa studkampo estis usona politiko, kies evoluo tiel alarmis lin, ke li estis foje nomata "malamikado de Usono". Li volis admiri la grandajn homojn de sia lando, sed iĝis intence provokema oponulo de la "Unuiĝintaj Ŝtatoj de Amnezio". Li povis tre afable trakti siajn amatojn kaj amikojn, sed li estis kolera pri ĉia ajn kritiko. Li estis akutlingva kaj inteligenta spritulo, kiu foje kun supereca mieno uzis krudajn vortaĉojn. Leviĝanta stelulo en fruaj jaroj, li finiĝis mizera kripla alkoholulo.

La gepatroj de Eugene Luther Gore Vidal estis malfeliĉa paro. La patro Gene, konata atleto, amoris kun serio da virinoj, inter ili la fama pilotino Amelia Earhart, kaj la patrino Nina venĝis sin per serio da viraj amantoj. Gore abomenis sian drinkeman patrinon; al la patro li apenaŭ rilatis. Li rigardis la geavojn kiel siajn

verajn gepatrojn.

Neniu scias, ĉu post kvindek jaroj oni ankoraŭ legos la verkojn de Gore Vidal – aŭ de iu alia aktuale konata aŭtoro. La kvanto da paĝoj verkitaj de Vidal estas miriga. Eĉ post diboĉa vespero li diligente verkis ĉiumatene, kaj produktis romanojn, eseojn, film- kaj teatraĵtekstojn, kaj aŭtobiografiojn.

Eble plej legindaj restos liaj romanoj kun historia fono, plej ofte usona. Li kredis, ke la "fondopatroj" de la lando havis noblajn intencojn malgraŭ siaj propraj mankoj, sed ke la originala respubliko iom post iom iĝis imperia oligarĥio. Eĉ kiam li verkis pri homoj, kiujn li admiris, ekzemple Aaron Burr kaj Abraham Lincoln, Vidal aldonas neadmirindajn detaletojn, kaj ĉiam surbaze de esploroj. Fojon post fojo li akuzis, ke Franklin Delano Roosevelt, kies meritojn li agnoskis, bone sciis, ke Japanio planas ataki Usonon fine de 1941, sed permesis la masakron ĉe Pearl Harbor por povi stiri Usonon en la Duan Mondmiliton. Tiuj akuzoj estigis akrajn reagojn, sed elstarigis Vidal kiel politikan komentiston.

Inter liaj historiaj romanoj kun usona fono, kiujn oni rigardas plej bonaj, estas *Burr* (1973), *Lincoln* (1984), *1876* (1976), kaj *Empire* (1987). Postaj verkoj ricevis malpli da laŭdoj kaj legantoj. Krome li verkis romanon pri la romia imperiestro nomata Julianus, kiu volis restarigi la antaŭkristanisman religion de Romo, kion Vidal aplaudis: li multfoje atakis la "ĉielvivan dion", kiu laŭ li ne ekzistas.

Vidal estis samseksemulo sed rifuzis tiun nomon: laŭ li ĉiuj homoj estas "ambaŭseksemaj". Tamen li pioniras

romanojn pri samseksemuloj en epoko, kiam tio povis esti danĝera en Usono.

Li estis probable la plej dezirata gasto de televidaj intervjuistoj, kaj li tre ĝuis tiun medion, ofte elbuŝigante aŭdacajn sed pensigajn frazojn. Aparte famaj estis liaj debatoj, fakte disputoj, kun alia pintlanga spritulo, la dekstrema katoliko William Buckley. Dum Vidal restis trankvila, Buckley perdis la sinregadon kaj diris vortojn, kiuj ŝokis aŭskultantojn de tiu jardeko (hodiaŭ ili estus simple ĉiutagaj slangajoj).

Apenaŭ estis iu, kiu pli vojaĝis ol Gore Vidal. Li loĝis en pluraj lokoj en Usono, sed pasigis grandan parton de la vivo en Italio, en Romo aŭ en iama kasteleto en Ravello. Por aperi en televidaj intervjuoj li konstante pendolvojaĝis inter Eŭropo kaj sia naskiĝlando.

Jen kelkaj diroj de tiu vortpotenca homo.

*Narcisisto estas iu, kiu estas pli bela ol vi.*

*Bonŝance por la diligentaj lunatikoj, kiuj regas nin, ni estas permanente en la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Amnezio.*

*Usonaj verkistoj volas esti ne bonaj sed geniaj, kaj do estas nek nek.*

*Post difinita aĝo oni preferas procesojn al seksumado.*

*Ni devas ĉesi nian kutimon babiladi, ke nia estas la plej granda demokratio sur la Tero, ĉar ni eĉ ne havas demokration. Nia estas iuspeca militprepara respubliko.*

*Enkore mi estas propagandisto, feroce malamanto, enuiga ĉagrenemulo, memkontente certa, ke ne ekzistas homa problemo, kiun oni ne povas solvi, se homoj simple farus tion, kion mi konsilas.*

*Usono estis fondita de la plej inteligentaj homoj en la lando – kaj ni ne vidis ilin poste.*

*Ĉiufoje, kiam amiko sukcesas, io en mi mortas.*

*La plej belaj vortoj en nia lingvo estas: Mi diris tion al vi.*

Malgraŭ ĉiaj mankoj, Gore Vidal estis iuspeca profeto, kiu avertis pri la misvojo de sia hejmlando. Liaj avertoj estas hodiaŭ pli pensigaj ol iam ajn antaŭe. **E**



Gore Vidal 1984

# La kontraŭdiroj de la vivo

## CHARLES STEVENSON (ADELAJDO)

Miaj pensoj svingiĝis dum mi rigardis malsupren el la aviadila fenestro al la solena labirinto malsupre de vojoj, pontoj kaj konstruaĵoj. Mi ĵus forlasis la duonon de mia vivo: trankviladon, solecon, longajn jarojn de vidveco. Nun mi estas survoje al mia plej sprita vivo: ĉiutaga ekscito, la kaprico de la tago kaj varmkora amikeco.

Kun ĉi tiuj pensoj mi surteriĝis ĉe Aviadilhavento Birmingham International, ĉe la periferio de la dua plej granda urbo en Britujo. Jen oni kondukis min tra la 'gurdo' de la misfama Spageta Krucvojo, kaj la senfine tordiĝanta konfuzo de urbo konstruita antaŭ ajna koncepto pri urboplanado. Tamen, ĝia trafikreto estas efika. Miloj da stratoj de domoj, kiuj

aspektas neimageble similaj. Amaso da betono, bitumo, turdomoj kaj eĉ sinteza herbo sur ĝiaj futbalkampoj. La Bullring (Bovringo), kie ekzistas merkato dum pli ol mil jaroj, estas amaso da butikoj kaj trairejoj, ligitaj al unu el la plej homsvarmaj fervojaj stacidomoj de Britio, Birmingham New Street. Ĉi tie estas homa formika nesto de komplikaĵoj, de la malnova apud la nova. Tamen! Ĝi havas vastajn parkojn, kaj enormajn arbojn kun foliaro tiel densa, ke reĝo Karolo la 2a realisme povus kaŝi sin en ĝi de sia malamiko. Subtilaj kontraŭdiroj ŝajnas esti parto de la homa kondiĉo.

Mi ĝojis miksiĝi kun mia generacio ĉe la fino de vivo. Maljuneco havas sian belecon, eĉ inter apopleksio, morto kaj blindeco. Tial mi fasciniĝas pri mia preskaŭ blinda konato, ĉiam gaja eĉ kiam li renversis glasojn da vino. Mi renkontis viglan virinon kun okdekjara sperto de Birmingham kiel iamaj urbestriro kaj infanĵuĝistino. Emerita Lib-Dem-politikisto certigis al mi, ke dum lia partio estis en koalicio kun la konservativa registaro, ekzistis nenia de la nuntempa politika kaoso. Mi estis ravita de la sukcesa hotelposedanto, kiu venkis teruran infanaĝon de infanmistraktado, "Mi estas la escepto al la sinteno de 'kion vi povas atendi de tia edukado'."

Amiko mia planis montri al mi Wolverhampton, sed anstataŭ tio, mi devis viziti lin en malsanulejo post lia



*Morisho Walingamina renkontis Heather Heldzingen apud hotelo Birminham, konstruita en 1368*

apopleksio. Li suferis tion la nokton antaŭ nia planita renkontiĝo.

A! Kiel mi ĝojis pri la juna generacio gajplena. Tion unue mi renkontis je grupo de ridantaj junaj virinoj, entuziasmaj pri siaj roloj en la Trent-vala turista trajnfesto. En tio ili aktoris kiel parto de la Terarmea sekcio de la Hejma Fronto en la Dua Mondmilito. Kiel ili ĝojis. Mi trovis la junan generacion plene da vivo-ĝojo, kaj memfide kaptita de juneca kaj freŝa sagaco. Mi renkontis afrikan rifuĝinton el kampara fono, kie oni ne rekonas

tranĉilojn kaj forkojn kaj kiu komencis en lernejo je la aĝo de dek du jaroj! Nun li estas civila inĝeniero. Kaj mi renkontis ankaŭ timeman deksepjaran futbaliston por West Bromwich Albion, kiu parolis entuziasme pri la pozitiva aspekto de vera sporta spirito. Ve, en Britujo kiel aliloke en la mondo, ekzistas la nuntempa persekutata klaso: rifuĝintoj el teruraj kondiĉoj. Ili mirinda sinteno brilis malgraŭ subpremo kaj publika denunco. Ĉe la pleja bona mankas rankoro, memkompato, kaj restas nur senkulpa kaj aŭtenta amikeco. Mi ĝoje gustumis turkan manĝaĵon, kie mia gastiganto ekamuziĝis ĉar lia lando venkis la mian ĉe Galipolo. Pro mia ŝajne stranga akĉento oni intervjuis min ĉe la islama radiostacio – pri plenkreskiĝo en Aŭstralio.

*Charles Stevenson kun  
Cecilia, Ramazani, Rashidi  
kaj Faila*

Mi havis la maloftan ŝancon renkonti la generacion de sesjaruloj – senkulpecaj, purfidelaj kaj altvalore amikecaj – malproksime de ajna penso pri infanmistraktado.

Kompreneble mi renkontis, aŭ por esti pli honesta, evitis aliajn en ĉi tiu plej multkultura urbo en Eŭropo. Efektive indas sperti teruran rasismon. Kiel oni povas nei tian nescion kiel "Via Reĝo donas al vi privilegion"? La Granda Gatsby ankoraŭ floras. Egoismuloj, tromemfiduloj

*Daŭras >*



abundas, kaj la komunikilaro elmontris kazojn de fraŭdo en iuj respektataj financejoj. Monumenta avideco abundas.

Renkonti homojn estas kvazaŭ "organizita vojaĝo" por mi. Mia pilgrima vojo estis pri homoj, ĉar ni ĉiuj apartenas al la homamaso. Kaj la granda plimulto el tiuj estas bonintencaj. Ni estas sociema specio.

Jen kuracilo kontraŭ la malespero, kiun oni sentas pro la malzorgema frenezeco de milito en Ukrainio, la palestina konflikto, la detruado de la ekosistemo de la planedo, kaj la profanaĵo de influema mensogado de la demagogo. Koŝmaraj hororoj, kiuj alfrontas nian ekzistadon mem.

Tamen! Estas ankaŭ sublima mildeco en la homa naturo. Ĝi animlevas mian vivon.

Kun ĉi tiuj pensoj mi revenis al mia kvieta vivo. Ne estas sono de la trafiko de homaj aferoj. Ni komunikas al ni mem ne per vortoj, gestoj, mieno, sed per silento. Ĉiu granda invento, ĉu ne, ĉiaj muziko, arto kaj literaturo devenas ne de la hasto kaj bruego de la vivo, sed de la silenta kavo de la menso. Do! Silento havas sian lokon en la vivo. Super kaj preter la turbulado de ĉi tiu mondo kuŝas la silento de eterneco.

Estas mirinde vivi en ĉi tiu fenomena mondo de mistero kaj sperti ĝiajn kontrastojn, ĝiajn kontraŭdirojn. 📖

## Lingva komento pri artikolo en ESK 150 FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)

En sia artikolo *Vizito al suda Francio en vitro*, aperinta en la junia numero de *Esperanto sub la Suda Kruco*, David Ryan esprimas sian surprizon, ke oni uzas la anglan vorton "ticket" por diri kvitancon. Por kvitanco en la franca lingvo necesas diri "Le ticket de caisse", kiu estas kompreneble mallongigita al simple "ticket". Pro la situacio ĉiu komprenas, ke temas pri "ticket de caisse". Laŭ dekreto aplikita ekde la 1a de aŭgusto 2023 la kliento devas nepre peti kvitancon por ĝin akiri. La celo estas limigi la uzon de danĝeraj substancoj. Pro tio antaŭ aŭ post ĉiu aĉetado nun aŭdeblas "Vous voulez le ticket?" (Ĉu vi deziras la kvitancon?). Tamen, ĉu vere "ticket" estas angla vorto "ŝtelita" de la francoj? Se oni iras pli malfrue en la historio, la angla vorto "ticket" venas de la franca vorto "etiquette". Same kiel "ticket" multaj francaj vortoj migris al Anglujo kaj revenis. La francoj, ne sciante la historion de sia lingvo, ne plu

rekonas ilin, kaj same kiel David opinias, ke temas pri angla vorto. 📖

### Vizito al suda Francio en vitro DAVID RYAN (WELLINGTON, N-Z)

En januaro 2023 mia edzino kaj mi pasigis iom pli ol unu semajno en suda Francio (en Provenco-kaj apudaj regionoj).

Oni scias ke suda Francio estas paradizo dum somero kaj milionoj da homoj vizitas la tiun marbordon por ferio, naĝi en la maro, trinki vinon dum sunplena tago, kaj ĝui la faman sudfrancan kuirarton. En vitro, ne samas...

Tamen, vizito al suda Francio dum vitro havas kelikajn avantaĝojn. Ekzemple, ne estas tiom da turistoj, ni facile trovis sidlokojn en trajnoj, ni neniam devis atendi en vico, kaj ni trovis hotelĉambrojn je ne tre alta prezo. Male, suda Francio dum vitraj monatoj estas komete fermita.

Ni vizitis Avignon kiu famas pro la (mez)orto kaj la Papa Palaco. Je la komenca de la 14-a jarcento la tiamaj Papo, profaciato en floro, decidis translokiĝi al Avignon, al granda gotika konstruaĵo Papoj konstris dum preskaŭ 100 jaroj. La Palaco nun estas turisma loko kaj ejo por ekspozicioj kaj kongresoj.

Poste, ni pasigis dimanĉon en Montpellier, sufiĉe grandan urbon kun loĝantaro de 300 000. Ni festis disaŭron en

katedralo kaj, je elfino, proksimume 10 soldataj stari ekster la katedralo – kun malrapidaj Mi ne kutiaĵis demandi kial, sed ŝajnis, ke ili estas tie por protekti homojn en la katedralo. Ĉu ni nun kuŝas en tiel danĝera mondo? Post vizito al la katedralo, ni vizitis bazaron, kie oni vendas brokantaĵojn, librojn ktp. Poste, do, reniu butikoj estas malfermita. Felice ni trovis etan restoracion, sed ŝajnis ke dimanĉo



Papa Palaco en Avignon

# La mondo de Harry Potter

## FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)

Antaŭ la komenco de la lernojaro kiel konkludo de la feria periodo, mia filo ĉiam proponas al miaj nepoj, ĝemeloj dekdujaraj, ion interesan. Ĉijare li elektis viziton al la studio Warner Bros en Leavesden apud Watford (Anglujo), kie estis filmitaj la ok filmoj bazitaj sur la verko de Joanne Rowling. Li havis du celojn: plezurigi la junulojn, kiuj tre bone konas la filmojn kaj doni al ili banon en la angla lingvo, kiun ili devige lernas en la lernejo.

Persone mi ne bone konas tiun serion, mi nur legis la unuan libron kaj rigardis neniun filmon kontraste kun aliaj vizitantoj, kiuj surportis vestaĵojn kiel tiujn videblajn en la filmoj aŭ kiuj faris tiklajn, precizajn demandojn al la multnombraj gardistoj. Tamen mi rekomendas la viziton.

Estas du partoj en tiu ekspozicio. La unua prezentas la scenejojn bone konatajn al la admirantoj de Harry Potter... kaj de la aktoroj, kiuj pasigis dek jarojn en tiu loko, de la aĝo de ĉirkaŭ dek je la komenco de la filmo. Inter la filmadoj de la scenoj ili studis tie la samajn programojn kiel ĉiuj infanoj. Eblas promeni de la dormejo al la diversaj ŝtuparoj, la manĝejo, la kavernoj, la miniaturo de la kastelo (kvankam ĝi estas impona en la filmo), la trajno, kun ĉiuj gravaj objektoj en la kupeoj, la banko kun ties laboristoj.

La dua parto prezentas tion, kio estas malantaŭ la scenejo, la multnombrajn maskojn, la desegnojn, la procedojn por krei specialajn efektojn. Ne imageblas la imagpovo, la lerteco, la kompetenteco de la teamo, kiu produktis la filmojn. Ne imageblas la pacienco kaj labordaŭro.

Sed ili sukcesis krei magian mondon, kiu revigas certe la infanojn, eble ankaŭ kelkajn plenkreskulojn.

Necesis granda buĝeto por produkti la filmojn, sed mi opinias ke pro ilia sukceso tiom nekredbla, pli ol la direktoroj povis imagi, ili alportis profiton. Tamen la Warner Bros studio daŭre riĉiĝas pro la famo de Harry Potter, profitante de la entuziasmo de la vizitantoj. Eblas foti preskaŭ ĉie sed se iu volas provi "flugi" sur balailo, nur deĵoranto rajtas filmi lin aŭ ŝin kaj la prezo de la videofilmado estas surpriza. En la kafejo inter la du partoj de la ekspozicio eblas aĉeti inter aliaj manĝaĵoj longegajn hamburgerojn, kosta amuzaĵo. En multaj partoj troviĝas vendejoj, sed la lasta, ĵus antaŭ la elirejo, estas supermezure granda. Por plezurigi miajn nepojn mi aĉetis sakon da bombonoj. En ĝi enestis la listo de la diversaj gustoj: vermo, cerumeno, vomaĵo ktp.

*Daŭras >*



Mi povas certigi ke ne temis pri falsa reklamo.

Por viziti la studion necesas rezervi lokon kaj foje longe atendi por akiri la oportunon.

Ĝi estas vizitinda kaj vizitita de miloj da fanatikuloj kaj scivolemuloj. **E**



# KONTRIBUU al **ESPERANTO** sub la suda kruco

La limdato por la venonta numero estas la 1a de februaro. Sendu artikolojn, rakontojn, enigmojn, receptojn, fotojn ktp al [esk@esperanto.org.au](mailto:esk@esperanto.org.au) - ni bezonas vin!





# Bahaismo kaj Esperanto

PAUL DESAILLY (ADELAJDO)

“Por faciligi kompletan interkomprenon inter ĉiuj homoj, universala helplingvo estos adoptita... En ĉiuj sanktaj libroj kie vi trovas tian deklaron?” – Abdul Bahá, *Divine Philosophy*, ĉapitro 2.

Gvidantoj ĉi tie estas referencataj kiel individuaj sekvantoj de Bahá'u'llah (prononcita proksimume: Ba Ho La), la Persekutito, kiu en siaj mez-kvardekaj jaroj fondis Bahaismon en Persio en 1863. Demokratie elektitaj Bahaaj gvidantoj ekzercas aŭtoritaton ekskluzive kiel

naŭpersonaj Asembleoj ĉe lokaj, regionaj, naciaj kaj internaciaj niveloj. Neniu pastrara klaso ekzistas! Aŭtoritato apartenas al la Asemblea kolektivo! Por Bahaano, kritiki la estrojn aŭ instituciojn de Bahaismo estas neakceptebla mispaŝo, kiu povus rezultigi sankcion, kiel ekzemple, perdon de voĉdonrajtoj. Kritiki samreligianon, krom malice por intence damaĝi ties reputacion, estas, tamen, permesata. Ke ĉi tiu Bahaano en Adelajdo kritikis, ekde 1991, influhavajn Bahaajn individuojn en la Bahaa anglosfero, sed neniam perdis la voĉdonrajtojn, indikas akcepton de tiu kritiko. La evidenta malinklino de gvidantoj esperantistiĝi aŭ promocii la helpilan

principon estas, eble, ne taksita damaĝa aŭ ne-pia. Sed ĉar ilia neagado pri la helplingva principo nun estas prezentata, en la plej bona kazo, kiel nedefendebila nescieco, oficialaj sankcioj eble atendas ĉi tiun aŭstralian pekulon. Eble ne, ĉar ĉiuj Bahaanoj per sendependa esplorado de la vero kaj per malferma konsultado estas devigataj batali nescion. Tia neagado de Bahaaj aŭtoroj kaj akademiuloj dum jardekoj senvivigis la helplingvan principon.

*Daŭras >*



*Shoghi Effendi*

En 1986 la Domo de Justeco rimarkis, ke Bahaanoj kunlaborantaj kun esperantistoj, 'kunhavas multajn idealojn'. Sed, pro suboptimuma konsultado, dum 89 jaroj, miskomprenoj abundis (ĉefe en Bahaa flanko, ve!) pri la facileco de Esperanto. El neaŭtentigitaj Bahaaj fontoj *Parizaj Paroladoj*, (kvankam Abdul Bahá parolade alvokis ĉiujn aprezi Esperanton), ekde 1911 fontoj ankoraŭ citas lin ĉi tiel: "Esperanto en sia nuna formo estas tre malfacila por kelkaj." Tiun sensencaĵon Shoghi Effendi solvis en oficiala letero perslingve verkita en 1926, sed ties utilo malmultis ĝis 2015, kiam profesoro Meyjes en verko rekomendita de Ĥajfo angligis la oficialan pozicion de Bahaismo; tr: B. Westerhoff: "Pere de Esperanto la kazo estas malsama, ĉar ĝi estas lingvo facila kaj parole kaj skribe. Se la geamikoj [Bahaanoj] lernus tiun ĉi lingvon, la rezulto estus generado de pli granda sento de amo kaj unueco inter ili, kaj tio ebligus propagandi la Instruojn revelaciitajn por tiu ĉi Nova Epoko..."

La ok milionoj da Bahaanoj kredas, ke "la Promesito el ĉiuj popoloj de la mondo jam aperis. Ĉiuj popoloj kaj komunumoj atendis Revelacion kaj Li, Bahá'u'llah estas la plej eminenta Instruanto kaj Edukanto de la homaro." – Abdul Bahá en *Bahá'u'llah kaj la Nova Epoko (BNE)* de John Esslemont, paĝo 1. Sen precedenco en religia historio, tiuj instruoj kaj principoj de Di-sendita Mesaĝisto estas pluekzistantaj kaj alireblaj en originalaj manuskriptoj, de Li mem verkitaĵ, por ke ni kaj estontaj generacioj povu intense esplori Revelacion por ni mem, tiel malhelpante por ĉiam la damaĝojn de homa interveno kaj mis-interpretado faritajn de koruptaj aŭ sensciaj elitoj. Sed, ĉe nedemokratiĵaj entoj, aĉa aŭ simple erara kaj privilegia aliro ofte persistas, kiel en la Bahaa Eldonejo kaj en la Domo-

sankciita Bahaa Internacia Komunumo (BIK), malgraŭ uverturo kaj petego de esperantistoj de Ilinojso kaj precipe de la oficejo de Esperanto-najbaroj de BIK ĉe la sama, fama, UN-adreso, Novjorko.

En *Bahaaj Skriboj* atentokapte abundas specifaj kaj mirindaj referencoj al la lingvoprincipo, al Esperanto, kaj al D-ro Zamenhof. Foje Abdul Bahá neformale renkontis unuopajn esperantistojn; ofte li mem paroladis en niaj E-kluboj kaj establaĵoj. Iufoje en Parizo, 1913, li kvarfoje rekte menciis Esperanton kaj unufoje oblikve citis ĝin ene de du kortuŝaj alineoj. La fama skota esperantisto, D-ro Esslemont, registris tiun paroladon en *BNE*, kiun Shoghi Effendi, en sia majstra verko *Dio Preterpasas*, jene priskribis: "tiu grandioza, aŭtoritata kaj ampleksa enkonduko al Bahaaj historio kaj instruoj verkita de tiu purkora kaj senmorta antaŭenigulo de la Kredo, J. Esslemont." Ke *BNE* konsistigas aŭtoritatan verkon grave menciindas! Iam Shoghi Effendi mem propre direktis revizion de *BNE*. Sed, en 1950 la Bahaa Eldonejo en Usono, akiris kopirajton kaj arogis al si prerogativon de la Bahaa Gardanto, por deklari la kronologion de la Sep Kandeloj de Unueco de Abdul Bahá. Ĝi eĉ publikigis en *BNE*, kvazaŭ skribite de Esslemont, prokrastitan rolon por la *Lingva Kanelo* en lasta pozicio – t.e. post kiam la preferataj *Kandeloj* de la Komitato estis jam atingitaj. Tiuj damaĝaj intrigoj de usonaj Bahaanoj aperis en ĉapitro X de *BNE* pri lingvo ĝis la 1970a eldono. Ilia ekskluziva rego de, kaj enmiksiĝo en *BNE* vidigas en la aktuala eldono entute eraran interpretadon pri *Abdul Bahá en Londono* rilate al unusola Universala Lingvo, kiu kaŭzas malplivalorigon de Esperanto kiel la potenciala helplingvo. Neniu sukcesis eĉ ekkonvinki la nunajn posedantojn de *BNE*, en Usono, agnosketi la damaĝon

faritan kaj ankoraŭ okazantan. Dum jardekoj oni lasas en "la lernolibro de la Kredo" falsan ideon rilate al la konsilo de Abdul Bahá pri unusola Universala Lingvo "en tre malproksima tempo". Verdire, nepre necesas ke aperu, kiel eble plej baldaŭ, en reviziita eldono, liaj ripetataj kaj emfazaj admonoj pri urĝe bezonata Universala Helplingvo, kaj pri liaj malambiguaj instrukcioj pri Esperanto. Jen grava ofendego al la homaro (kaj aparte al la ne-angla mondo!) malkaŝita en ĉi tiu skandalraporto. La misinformo etendiĝas vaste preter Usono en centoj da tradukoj, ĉar la angla originalo, kune kun ties "korektoj" de la komitato, estis (kaj ankoraŭ restas!) la monda modelo por la koncernaj tradukoj.

Abdul Bahá al Bahaanoj: "Nepras disvastigi Esperanton malproksimen kaj studi ĝin – religia devo." Abdul Bahá al Esperantistoj: "Dankon! Al vi mi dankegas. Mi gratulas vin el la profundo de mia koro." Bahaanoj! Eksterordinara dankemo; ĉu gesto unika? Kial? Al esperantistoj en Vaŝingtono D.K. Abdul Bahá klarigis je la 25a de aprilo 1912: "Tial la prioritata servo al la homa mondo estas instali tiun ĉi internacian helpan komunikrimedon."

Atinginte la aĝon de dek kvin jaroj, Bahaanoj elektas sendepende de iliaj gepatroj, ĉu oficiale aliĝi al la Kredo per subskribo de Sankta Interligo, en kiu oni solene promesas obei gvidon skribitan de la Universala Domo de Justeco kaj de la centraj Figuroj de nia religio, ekzemple de Abdul Bahá. Malmultaj Bahaanoj konscias, eĉ periferie, pri liaj instrukcioj pri Esperanto. Por Bahaaj junuloj de la 21a jarcento, Ludovik Zamenhof estas nomo malofte aŭdata, kaj lia lingvo de monda paco kvazaŭ itala opero enscenigita en utopio! Kial do? La Universala Domo de Justeco, kiel la supera Bahaa aŭtoritato

ekde 1963, alvokis oficiale jam en 1985 ĉiujn popolojn urĝe okupiĝi pri la fundamenta principo de internacia helplingvo kaj Abdul Bahá fojon post fojo prioritatis Esperanton! Redaktoroj ĉe Vikipedio kaj la prestiĝa *Chambers Dictionary of Beliefs and Religions* (Vortaro de Kredo kaj Religioj – aperigita de famkonata usona firmao, Chambers) agnoskas multe pli de la Esperanta-Bahaa-ligo (kaj publikigas ĝin!) ol Domanoj en Ĥajfo aŭ Bahaaj proprietuloj kaj akademiuloj prizorgante [bahaiteachings.org](http://bahaiteachings.org), [bahaiblog.net](http://bahaiblog.net), [bahaichronicles.org](http://bahaichronicles.org) ktp.

Ke Bahá'u'llah estis esperantisto ne efikas al Bahaaj gvidantoj en la anglosfero kaj do same (mal)agag preskaŭ la tuta Bahaanaro: Ĉu hipokriteco en religio. Kial?

Kaj jen, la sama problemego altrudas Bahaanojn de la generacio de miaj adoleskaj infanoj. Abundas influhavaj blogoj, kies Bahaaj proprietuloj ignoras kaj ruze pritraktas Esperanton. Pli akriĝas ĉion ĉi malveraj asertoj starantaj dum jaroj ĉe Bahaipedia, kiuj baziĝas je oficiala Bahaa parolado kadre de la Simpozio Nitobe (Beijing 2004) pri la angla kiel la ebla helplingvo. Kvin el ses eltiraĵoj pri Esperanto malgravigas ĝin, kaj okulfrape, eĉ ne unu citas imperativan vortigadon de Abdul Bahá en tekstoj aŭtoritataj, ke Bahaanoj devas studi ĝin. Pro mikspota kompilaĵo tendenca kaj ofta manko de kunteksto, la oficialaj dokumentoj prezentitaj kuniĝas por distordi la instruojn de la Bahaa Kredo al nova generacio interrete. Mi preĝas, ke la usona redaktoro degnos kontakti miajn teknologio-amantajn filojn aŭ almenaŭ per malferma konsultado ĉe la unusola vere interaktiva kaj honesta Bahaa blogo de anglalingvanoj, ekrebatos seriozegajn akuzojn. **E**

# Kiel lerta estas Artefarita Intelekto (AI)?

**DONALD ROGERS (WELLINGTON, N-Z)**

Larĝaj Lingvaj Modeloj (LLM) estas esence komputilaj programoj, kiuj povas trakti grandegajn kvantojn da teksto (kaj eventuale aliajn informojn) kaj respondi al demandoj pri tiu informo. Oni pretendas, ke tiu traktado estas formo de artefarita intelekto (AI).

Unu el la konataj LLM-oj estas ChatGPT. Ĝi mem asertas: “Mi uzas kompleksan matematikan modelon por analizi tekston kaj generi respondojn. Tiu modelo permesas al mi kompreni la signifon de vortoj kaj frazoj en la kunteksto de la demando aŭ tasko, kiun oni donas al mi. Kiam oni donas al mi demandon, mi analizas la tekston por determini ĝian signifon kaj generi respondon kiu, laŭ mia trejnado, plej verŝajne utilos kaj respondos al la demando.”

Google Translate estas eble la plej konata sistemo bazita sur LLM. Google lanĉis ĝin en 2006 kaj ĝi nun traktas ĉirkaŭ 130 lingvojn (inkluzive Esperanton). Ĉirkaŭ 500 milionoj da homoj uzas ĝin ĉiutage. Komence ĝi utiligis statistikan metodon, per kiu ĝi tradukis la fontlingvon en la anglan kaj tiam tradukis la anglan version al la cellingvo. En 2016 Google lanĉis novan sistemon nomitan Neŭra Maŝina Tradukado, per kiu ĝi tradukas

la fontlingvon rekte al la cellingvo. Tio plibonigas la kvaliton de la tradukaĵoj.

Multlingvaj LLM-oj kaj AI-oj plej bone respondas al informpetoj en la angla lingvo. Esploristoj montris ke LLM-oj programitaj por respondi demandojn en multaj lingvoj funkcias pli bone se oni petas en la angla lingvo. Iuj esploristoj komparis du metodojn. Unu metodo estis enigi la informpeton en la origina lingvo kaj ricevi la respondon en la sama lingvo. La dua metodo estis peti la saman modelon traduki la peton en la anglan, tiam enigi la anglan tradukitan demandon al la modelo kaj ricevi la respondon en la angla. La esploristoj testis sep modelojn. Por ĉiuj la dua metodo donis rezultojn ĝis 3,5 % pli ĝustajn ol por la unua metodo.

La LLM-oj havas problemon, ke la plejmultaj informoj uzataj el la Interreto estas en la angla lingvo. Mi suspektas ke ili laboras en la angla kaj tradukas la respondojn al la lingvo de la uzanto. Iuj esperantlingvaj respondoj estas iom anglecaj, ekzemple esperanta interago kiu tekstas jene: “Vi povas demandi demandojn pri...” anstataŭ la atendata “Vi povas demandi pri...”, kaj “...helpos vin iĝi pli komforta kun la lingvo” anstataŭ... “pri la lingvo”. Tamen la ĝenerala lingvonivelo



estas bona kaj komprenebla.

ChatGPT funkcias pli bone responde al demandoj, kiuj postulas memoritan informon, sed funkcias malpli kontentige pri demandoj, kiuj postulas kritikan analizadon. Multo restas fareda por igi t.n. multlingvaj modelojn vere multlingvaj. Multaj spertuloj argumentas, ke ĝi estas longe for de homsimila intelekto.

Julen Etxaniz k.a. konkludis, ke lingvaj modeloj ne kapablas levpovi sian tutan multlingvan potencon, kiam oni informpetas en ne-angla lingvo.

Problemoj de LLM-oj: ili enhavas biasojn kaj emfazas iujn vidpunktojn; ili eble enhavas antaŭjuĝojn, kaj personajn informojn; ili povas generi diskriminacian aŭ stereotipan lingvaĵon, aŭ netaŭgajn komentojn; ili eble kopias erarojn en sia enigita informo, kaj uzas ilin kvazaŭ ili estus veraj; ili ŝajne pretendas, ke ili estas sensivaj kaj inteligentaj.

Komercaj programaroj ne publikigas siajn limigojn en detalo, do ne eblas al la publiko taksi la meritojn kaj riskojn de tiuj sistemoj. Malfermitkodaj programaroj por LLM donas trasideblecon pri ĝia funkciado, ĝia arkitekturo, la trejnaj datumoj kaj metodoj kaj uzmanieroj. Povante inspekti la kodon kaj algoritmojn ebligas plian fidon, asistas pri reviziado kaj helpas certigi etikan kaj leĝan konformecon.

La pliiĝanta uzado de larĝaj AI-modeloj bezonas enormajn nombrojn de serviloj, kiuj povus eventuale konsumi tiom da energio kiom iuj landoj. Bedaŭrinde tio okazas dum ni provas redukti la uzadon de karbo por produkti elektron. Ĉu oni povos plirapidigi la generadon de verda elektro sufiĉe por satigi la venantan konsumadon de energio dum AI enkorpiĝas en nia socio. OpenAI, la kompanio malantaŭ ChatGPT, agnoskis la problemon kaj

asertis, ke ĝi konstante provas pliigi sian efikecon. Evidentiĝas ke malpli grandaj modeloj proksimiĝas al la kapabloj de la plej grandaj, kaj konsumas nur frakcion de la elektro.

Do konsideru la konsilon de José Antonio del Barrio: “Malfidu la artan inteligenton, eĉ se ĝi parolas Esperanton.”

## Bibliografio

Chris Staker-Walker, “Multilingual AIs are better at responding to questions in English”, *New Scientist*, 15 August 2023.

José Antonio DEL BARRIO, *Malfidu la artan inteligenton, eĉ se ĝi parolas Esperanton* [delbarrio.eu/blo/2022/12/arta-inteligento-en-esperanto](https://delbarrio.eu/blo/2022/12/arta-inteligento-en-esperanto)

Julen Etxaniz, Gorka Azkune, Aitor Soroa, Oier Lopez de Lacalle, Mikel Artetxe, *Do multilingual language models think better in English?* [arxiv.org/abs/2308.01223](https://arxiv.org/abs/2308.01223)


Matthew Sparkes, “Should we be worried about AI’s growing energy use?” *New Scientist*, 10 October 2023

Talal Rahwan kaj Yasir Zaki, *The academic reality of ChatGPT* [nyuad.nyu.edu/en/news/latest-news/science-and-technology/2023/august/the-academic-reality-of-chatgpt.html](https://nyuad.nyu.edu/en/news/latest-news/science-and-technology/2023/august/the-academic-reality-of-chatgpt.html)

*Google Neural Machine Translation* (Wikipedia) [en.wikipedia.org/wiki/Google\\_Neural\\_Machine\\_Translation](https://en.wikipedia.org/wiki/Google_Neural_Machine_Translation)

*ChatGPT* (Wikipedia) [eo.wikipedia.org/wiki/ChatGPT](https://eo.wikipedia.org/wiki/ChatGPT)

*BLOOM* (BigScience Large Open-science Open-access Multilingual Language Model) – malfermitkoda LLM [huggingface.co/bigscience/bloom](https://huggingface.co/bigscience/bloom)

*Open source large language models: Benefits, risks and types* [ibm.com/blog/open-source-large-language-models-benefits-risks-and-types](https://ibm.com/blog/open-source-large-language-models-benefits-risks-and-types) 

# Mia Danujo **PIA WETTERGREN (KOPENHAGO, DANUJO)**

Danujo estas la plej granda lando en okcidenta Eŭropo, se oni inkluzivas Gronlandon. Kvankam Gronlando apartenas al Danujo, kutime oni ne enkalkulas ĝin kiel parton de Danujo mem. (Poste mi revenos al Gronlando kaj la Feroaj Insuloj.)

Estas vere, ke nia lando, situanta norde de Germanujo, kun komuna tera landlimo, kaj Svedujo oriente, kun maro inter ni, nur estas makuleto sur mapo. Hodiaŭ nia loĝantaro eble estas 6 milionoj entute.

Danujo konsistas el Jutlando, kiu estas granda duoninsulo, Fueno kaj Selando kaj multe da etaj insuloj. La klimato bedaŭrinde ne estas tiom varma. Vintre tagoj estas mallongaj kaj malhelaj; ili daŭras eble nur 8 horojn. Somere tagoj daŭras preskaŭ 15 horojn.

Naturo malsamas: en Jutlando troviĝas alta montspino post glaciepoko, sed Fueno kaj Selando estas pli ebenaj. La plej alta "monto" en Danujo estas Ejer Bavnehøj kun nur 172 metroj!

Kopenhago, la ĉefurbo, troviĝas en

Selando. (Mi loĝas 15 kilometrojn apud Kopenhago.) La du aliaj plej grandaj urboj nomiĝas Aarhus, en Jutlando, kaj Odense, en Fueno. La tri urboj estas universitataj urboj kaj pro tio loĝas amaso da junuloj tie.

Danujo estas monarkia lando, kaj nia reĝino kaj ŝia familio estas ege popularaj. La kronprinceco strebas vivi kiel eble plej ordinare. La konstitucia tasko de la reĝino limiĝas al la subskribo de leĝoj.

La leĝoj estas kaj prezentataj kaj aprobitaj de nia parlamento, kiu nomiĝas "Folketinget" kaj konsistas el 179 membroj: 175 membroj el Danujo, du el Gronlando kaj du el la Feroaj Insuloj. La parlamento, kaj tute ne la reĝino, respondecas pri ŝtataj aferoj. Ŝi estas nur la simbolo de la ŝtata unuo. La nuna ĉefministro, ekde 2019, nomiĝas Mette Frederiksen, kaj ŝi estas socialdemokrato. Dum la pandemio ŝi estis ege ŝatata virino. Ni havis novan elektadon, ĉar tio okazos minimume ĉiun kvaran jaron. Ŝi estis reelektita. Norvegujo kaj Svedujo havas similan sistemon – nur Finnlando havas prezidenton. Tia estas Skandinavio.



*La Parlamentejo en Palaco Christiansborg, Kopenhago*

Ĉi tie oni ricevas pension ekde la aĝo de 67 jaroj. Tiu aĝo estas ĵus altigita de 65 jaroj. Bedaŭrinde la pensio estas malgranda, tamen la plejparto havas kroman pension el sia laborvivo. La kriterio por enhavi la ŝtatan pension estas konstanta loĝadreso en Danujo dum 40 jaroj.

La ĉefa religio estas protestanta, sed maljunuloj estas preskaŭ la solaj, kiuj praktikas efektive en preĝejoj.

Kvankam impostoj estas altegaj, kaj al kelkaj ŝajnas altaj, la entuta procentaĵo, kiu foriras de la malneta salajro, ne estas pli alta ol en aliaj landoj. Ni per la imposto ankaŭ pagas la sanasekuron kaj la asekuron kontraŭ senlaboreco kaj diversajn aliajn aferojn, kiujn oni en aliaj landoj pagas per apartaj asekuroj.

Nia sansistemo mem estas malsana pro manko de mono. Ekzemple, se oni estas implikata en trafika akcidento kaj estas transportata al malsanulejo, kutime oni devos atendi dum horoj kaj horoj antaŭ ol kuracisto alvenos! Atendolisto por nevidanĝerigaj malsanoj estas kilometre longa. Gravedaj virinoj riskas dum naskiĝo esti translokigataj al alia malsanulejo! Tamen multaj aferoj koncernantaj la sanon estas senpagaj. Nur la kuracisto, kiu povas plusendi vin al alia kuracisto aŭ malsanulejo estas tute senpaga. Grandaj partoj de elspezoj por medikamentoj, okulvitroj, fizioterapion kaj dentistoj oni devas mem pagi.

Ni havas grandiozan bibliotekosistemon. Estas eble pruntepreni librojn, filmojn, muzikon, ktp senpage. Ĉe la biblioteko okazos ofte koncertoj, prelegoj kaj teatraĵoj por infanoj.

Nun iom pri kunvivadaj formoj – multaj homoj ankoraŭ geedziĝas, sed aliaj preferas vivi kun kunulo sen geedziĝa atesto, kaj samseksemulaj kaj LGBT-

personoj (aliaj seksaj orientaĵoj) estas akceptitaj kaj ili rajtas geedziĝi.

Kutima familio havas du infanojn, kaj ambaŭ gepatroj rajtas resti hejme kun la bebo post ĝia naskiĝo: la patro dum 13 semajnojn, la patrino dum 26 semajnojn. Poste la bebo vizitas bebovartejon kaj je la aĝo de 3 jaroj la infano transiros al infanĝardeno. Kiam infanoj havas 6-7 jarojn, venos tempo por lernejo. Ili komencas en la 0-a klaso kaj kutime ili vizitas bazlernejon dum 9 jaroj. Diversaj ebloj sekvas poste: gimnazio, komerca lernejo, aŭ metilernado se la junulo preferas lerni "mane".

Multaj gepatroj malŝatas la senpagan bazlernejon kaj pro tio elektas multekostajn privatajn lernejojn. Mia pli juna filino estas instruistino en bazlernejo kaj rakontas pri la malbonaj laborkondiĉoj.

Estas dirite, ke viroj kaj virinoj havas samajn rajtojn, sed laŭ mi tio nur estas sur papero. Eble multloke la salajroj egalas, sed ankoraŭ estas pli bonaj ebloj por viroj – ankaŭ ĉi tie!

Ĉar mi loĝas apud Kopenhago, mi ŝatas rakonti pri la plej famaj vidindaĵoj tie. Kiu ne konas la rakonton pri *La Niksino*, la fama skulptaĵo, ĉiam sidante sur ŝtono en la haveno de Kopenhago? Ĉi estis fakte dufoje senkapigita pro kaj politikaj kaj artaj motivoj! *La Niksino* estas kreita laŭ aventuro de HC Andersen (kiu naskiĝis en Odense).

En Kopenhago kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estas du plezurparkoj, kiuj nomiĝas Tivoli kaj Bakken. Tivoli estas iom pli altkultura distro kaj ankaŭ ripoziga parko. Kvankam karuseloj por infanoj troviĝas, la impresoj estas je pli alta nivelo ol Bakken, kiu havas ĉiujn specojn de karuseloj kaj drinkejoj.

En Kopenhago estas multego da diversaj muzeoj kaj belega ĝardeno

*Daŭras >*

botanika. Tie estas kompreneble floroj, arboj kaj forcejoj, kie oni povas vidi sukulentojn, kaktajn ktp. Papilioj loĝas en propra domo kaj flugas libere inter oni kaj la floroj. Ĝi estas mirinda, kaj mi ŝategas viziti ĝin, kutime kun mia nepo. La plej granda domo nomiĝas Palmodomo. Tie kaj tropikaj kaj subtropikaj plantoj kaj arboj videblas. Ankaŭ tiu parko estas tre uzata de multaj homoj somere.

En Roskilde, la iama ĉefurbo, situas vizitinda katedralo, kiu estas en la listo de UNESKO. Aarhus, la dua plej granda urbo, estas belega kaj ĉarmega, situanta ĉe marbordo kaj kun rivereto, kiu trafluas la urbon. Dum multaj jaroj ĝi estis kaŝita.

Je la komenco mi skribis, ke mi ŝatus diri ion pri Gronlando kaj la Feroaj Insuloj. La situacio koncernanta Gronlandon estas iomete stranga kaj komplika ĉar ni fakte interŝanĝis tri etajn insulojn proksime al Usono kaj ekhavis Gronlandon. Tio okazis en 1917. En 1979 Gronlando ĉesis havi la staton de dana kolonio kaj ricevis aŭtonomion, sed daŭre estas pli dependa sur Danujo ol la Feroaj Insuloj. (Mi ne scias kial!)

Pro ĝiaj mineraloj Gronlando estas tre valora por gigantoj, kiel ekzemple Bill Gates, kiu ŝategus aĉeti rajtojn por ekspluati la tertrezorojn kaj tiel detrui la medion por la mizeruloj, kiuj ankoraŭ loĝas tie.

Dum jaroj la gronlandanoj havas grandegajn problemojn estante "danaj". Ekzemple, kiam infanoj vizitas la unuan klason, la lernolingvo estas la dana, ne la gronlandana. Notinde estas, ke la du lingvoj tute ne similas. Do, infanoj estas devigataj lerni la danan kiel duan lingvon. Kompreneble tio estas tre malfacila, kaj por havi edukadon ili devas transloĝiĝi suden al Danujo. Se ili ne sukcesas, estas

risko, ke ili estos senhejmuloj, kaj multaj fariĝas alkoholuloj.

La Feroaj Insuloj akiris aŭtonomion en 1948, kaj la instrulingvo en la lernejoj estas la feroa; do infanoj lernas la danan kiel fremdan lingvon. Homoj kiuj loĝas tie havas pli bonan ŝancon havi bonan vivon kaj edukadon ol la gronlandanoj. La feroanoj estas posteuloj de vikingoj, dum la gronlandanoj estas viktimoj de imperialismo!

En Danujo rasismo kreskas, kaj ĉar gronlandanoj fizike ne similas al la blondaj danaj kun bluaj okuloj, ili ofte havas malfacilan vivon, Tio ankaŭ validas por rifuĝintoj, azilpetantoj ktp. La ksenofobio ankoraŭ ekzistas kontraŭ ili.

Mi laboris preskaŭ mian tutan laborvivon ĉe lingvolernejoj por plenkreskuloj kiuj bezonis eklerni la danan. Kiam mi ĉesis labori somere 2019, mi esperantistiĝis. Somere 2023 mi sukcese trapasis la KER C1 ekzamenon.

Do, tio estis mia persona klopodo rakonti ion pri mia lando. 🇩🇰



*La eniro al la Parko Tivoli*



# Aŭstralia Kongreso de Esperanto kaj Somerkursaro, Ballarat

**FEDERATION UNIVERSITY OF AUSTRALIA • 5 – 14 JANUARO 2024**

Ne estas tro malfrue aliĝi. Dum 8 plenaj tagoj, vi plibonigos vian Esperanton, spektos prezentadojn kaj prelegojn, vizitos vidindaĵojn en la historia urbo de Ballarat, kaj societumos.

Niaj instruistoj estas Orlando Raola de Usono kaj Hoan Trăn de Vjetnamio.

**Orlando E Raola** estas doktoro, kemiprofesoro, kaj aktiva esperantisto. Li estis prezidanto de la Usona Esperanto-Asocio kaj estrarano de UEA, kaj nun estas membro de la Akademio de Esperanto.

Dum la lastaj 12 jaroj, **Hoan Trăn** (Ĝojo) laboris en la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam, okupis diversajn rolojn en Esperanto-organizoj, kaj nuntempe studas interlingvistikon en Pollando. En Vjetnamio, ŝi ĉefe instruas Esperanton kaj helpas alilandajn instruistojn.

La urbo de Ballarat estas la historia koro de Viktorio, Aŭstralio kaj estas fama pro sia ĉefa rolo en la orimpetego de la 1850aj jaroj. Kun okulfrapaj heredaj arkitekturajoj kaj vivanta muzeo, kiu kaptas la fervoron de tiu epoko, oni povas plonĝi en la aŭstralian pasintecon, nur horon kaj duono for de Melburno.

Por pli da informo, kaj aliĝi vizitu [esperanto.org.au/kongreso](https://esperanto.org.au/kongreso)



Ballarat, Viktorio

## Respondoj por la Kristnaska kvizo (paĝo 6)

1. Pagana Jultempo (vintra solstico) kaj romia Saturnalio (mezvintra festo)
2. En la angla Casper, Melchior kaj Balthazar
3. Martin Luther
4. Germanio
5. La 6a de decembro
6. Odino
7. A visit from St. Nicholas, kiu komenciĝas: "Estis la nokto antaŭ Kristnasko..."
8. Oliver Cromwell
9. Visko (mistletoe, latine *Viscum album*)
10. Zamenhof-tago, naskiĝtago de L.L.Zamenhof, 15a de decembro 1859



## Agnoskoj pri fotoj

- 5** Joanne Johns  
**6** Tessa Rampersad per Unsplash  
**7** Esperanto Populariga Asocio  
**8, 9** Katarina Steele  
**11** Los Angeles Times, 15 Julio 1984, Los Angeles Times Photographic Collection, UCLA Library, CC-BY 4.0  
**12, 13** Charles Stevenson  
**15, 16** Franciska Toubale  
**17** Fotisto nekonata. Senkopirajta  
**20** Steve Johnson per Unsplash  
**22** Folketingssalen i Christiansborg (Parlamentejo en Christiansborg), Aprilo 2012, *News Øresund* – Johan Wessman, CC BY 2.0 Deed  
**24** "randreu" per Wikimedia Commons, CC BY 3.0 Deed  
**25** Denis Frolow. Wikimedia Commons, CC BY-SA 4.0  
**26** Christina Winter per Unsplash  
**28** Ilia Dewi (el Indonezio) kaj Teofilo Jose Maria de Jesus (el Orienta Timoro), ĉe St Kilda dum la aŭstralia kongreso, Melburno, 2015. Foto: Joanne Johns

# Australian Esperanto Association

GPO Box 2122  
Melbourne VIC 3001  
Australia

esperanto.org.au  
info@esperanto.org.au  
(07) 4696 9293

Sandor Horvath | **President**  
Jonathan Cooper | **Vice-President**  
Heather Heldzingen | **Treasurer**  
Joanne Johns | **Secretary**

**Committee Members:**  
Terry Manley, Esther Parris

AEA was established for the promotion, teaching, and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Bradley McDonald | **President**  
Chris Krageloh | **Vice-President**  
David Ryan | **Secretary/Treasurer**  
Dave Dewar | **Assistant Secretary**

**Committee Members:**  
Erin McGifford, Josuo Moss, Stephen Epstein

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

# New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140  
Symonds Street  
Auckland 1035  
New Zealand

www.esperanto.org.nz  
esperantonewzealand  
@gmail.com  
0800 350 781

# What is this?

Have you picked up this magazine by chance and are wondering what language it is? It might look a bit like Spanish, but it's actually Esperanto.

## What is Esperanto?

Esperanto was specially planned and created as a neutral second language for people all over the world. So, if you come across someone from, say, Finland, you wouldn't have to speak Finnish and they wouldn't have to speak English.

Originally developed in the 1880s, Esperanto is currently experiencing a resurgence, with more and more people discovering and learning it online. It's spoken in over 100 countries and there are thousands of Esperanto clubs worldwide.

Esperanto is much easier to learn than any national language, because it was designed to be easy to learn. It's completely phonetic, and its grammar is logical and regular.

You can use Esperanto for travel, information, friendship, hobbies, and even business. The World Esperanto Association publishes a list of names and addresses of people who are happy to have you stay with them for free if you speak Esperanto.

The internet makes it easy to connect to Esperanto speakers in any country. Google, Facebook, Firefox and Linux all support Esperanto. There's an Esperanto version of Wikipedia, which has over 300 000 articles (more than the Hebrew version, for example).

## Isn't English enough?

National languages like English give an unfair advantage to their native speakers. People who have studied English for over ten years still feel at a disadvantage when talking with a native speaker.

Interested? See the contact details on the inside back cover.

